

BELGA ESPERANTISTO

47a Jaro — N-ro 3a

Marto 1955a

Fondita
en 1908a

Redaktejo-Administrejo :
de la Prezidanto de R.B.L.E.:

Maur. JAUMOTTE

Avenuo De Bruyn, 44
Wilrijk-Antverpeno

Oficiala monata Organo de

REGA BELGA LIGO ESPERANTISTA

Asocio sen profita celo,
aliganta al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO



Abonprezo:
Fr. 100,-

La Statuto de U.E.A.

En la januara numero de „Esperanto” Sro. Malmgren, prezidanto de U.E.A. parolas en sia novjara saluto pri problemoj, kiuj estiĝis interne de nia tutmonda organizaĵo kaj kiuj rilatis al propono ŝanĝi la statuton de U.E.A.

Generale la esperantistoj malmulte interesiĝas pri statutoj kaj regularoj kaj lasas tiujn aferojn al funkciuloj kaj estraranoj. Tio eble estas la kaŭzo ke oni preskaŭ nenion legis en nia gazetaro pri la daŭraj intertraktadoj kaj ofte viglaj diskutoj en la seno de komitato kaj estraro de U.E.A., precipe en iliaj kunvenoj dum la universala kongresoj de la lastaj jaroj.

Estas vere ke plena publikigo de internaj diskutoj ofte ne estas utila por atingi rezultatojn, kiuj devas esti akiritaj en subtilaj cirkonstancoj, sed aliflanke estas bedaŭrinde ke en la momento kiam la landaj asocioj kaj individuaj membroj devis voĉdoni pri la propono, oni ne estis preparita.

Stranga situacio estas ke kvankam la komitato dum siaj kunvenoj en Haarlem akceptis la novan statuton fakte unuanime (nur unu sindeteno kaj unu kondiĉa porvoĉo), tuj poste tri komitatoj kune forsendis ĉirkuleron al la landaj asocioj, en kiu ili rekomendis la neakcepton de la nova statuto. Tio kompreneble vekis bruan kaj proteston ĉe aliaj komitatoj, kiuj kontraŭĉirkuleris, ĉar tiu sinteno laŭ ili ne estis lojala. Sekve la voĉdonado ne okazis en trankvila atmosfero. La fakto ke la limdato ne permesis plenan pritrakton en la gazetaro kaj la kondiĉo ke oni nur rajtis voĉdoni „jes” aŭ „ne” por la tuto, enhavis la danĝeron ke oni povus pensi pri diktatoreco kaj certe kostis voĉojn al la estrara propono.

Ke fine 11.262 voĉdonis por kaj nur 4412 kontraŭ signifas ke la plimulto volas la ŝanĝon de la statuto, kiu tamen estas malakceptita, ĉar ŝanĝo bezonas 3/4 de la nombro de la esprimitaj voĉoj (15.674). Mankis nur 515 voĉoj.

Legantoj, kiuj scias ion pri la orga-

nizo de U.E.A. scias ke ĝis nun en Herongate (Anglujo), kie estas la sidejo de la asocio, troviĝas la Centra Oficejo. En tiu oficejo laboras la sekretario kun helpo de kelkaj oficistoj. La sekretario kaj oficistoj estas salajrataj kaj ne apartenas al la estraro de U.E.A. Ili fakte faras administran laboron.

La estraro konsistas el prezidanto, vic-prezidanto kaj 5 estraranoj. Ĝi ŝuldas respondecon al la komitato de 34 personoj, ĉefe reprezentantoj de la landaj asocioj. La tasko de la estraro estas tre vasta kaj konstante kreskas.

Por akceli la aferon de Esperanto sur internacia tereno la estraro ofte estas metata antaŭ grava tasko kiel ni spertis en la lasta jaro ĉe la defendo de nia lingvo antaŭ UNESKO.

Estas neeble postuli ke iu oferu tiom da tempo, kiom postulas simila tasko, sen iu kompenso. Talentaj homoj estas bone pagataj por sia ĉiutaga laboro kaj ili devas lasi tiun laboron por servi al Esperanto. Ankaŭ la kapabluloj inter la esperantistoj ne ofte estas riĉuloj kaj eĉ se ili estus, ni ne havas la rajton meti la pezon de la laboro por Esperanto sur la ŝultrojn de kelkaj. Tial la nova statuto proponis ke la sekretario de U.E.A. estu la sekretario kaj membro de la Estraro. Ĉefo de la Centra Oficejo ne estu sekretario, sed administranto, kiu havu la saman taskon kiel antaŭe la sekretario.

Se ni vere deziras ke altnivela propagando okazu sur internacia bazo, donante apogon al la naciaj klopodoj, ne sufiĉas la administra laboro de la Centra Oficejo kaj la tasko fariĝas tro granda por esti plenumata sen kompenso. La sindikatoj iris tiun vojon, ankaŭ la amatoraj sportistoj.

Ĉi supre ni jam konstatas ke la voĉdonado pruvis la konsenton de la plimulto de la Esperantistaro. Ni fidas ke la U.E.A. estraro per pacieneco kaj saĝeco trovos vojon al la celo, kiun ni devas atingi por povi fruktodone labori. Per iom da reciproka kompreno tiu vojo ne estos malfacile atingebla. H.J.B. (L.E.E.N.)

Direktoro Paul Borsinger
meritplena subtenanto de Esp.



En januaro 1955 Paul Borsinger, la direktoro de la svisa kurstonda radiostacio, festis sian sesdekjaran naskiĝtagon. Tiu jubileo donas al ni okazon prezenti al la Esperantistaro la viron, al kiu ni dankas la regularajn kaj ĝenerale ŝatatajn programojn en la internacia lingvo, kiuj per la antenoj de Schwarzenburg estas dissendataj tra la tuta mondo. En 1946 li konfidis mallongan programon en Esperanto al profesoro E. Privat, kaj en 1947 dum la Universala Esperanto-Kongreso li jam aranĝis ĉiutagan dissendon de raportoj kaj intervjuoj kun kongresanoj. En la sama jaro li enkondukis la duan Esperanto-programon, kiun li komisiis al redaktoro A. Baur. Tiuj du kvinminutaj programoj estis baldaŭ dufoje disaŭdigataj en la sama tago, tiel ke nun la tuta daŭro de la svisaj Esperanto-programoj estas dudek minutoj ĉiun semajnon. Direktoro Borsinger montris per sia sinteno al Esperanto kaj per la granda libereco, kiun li lasas al la parolistoj en la kreado de siaj programoj, admirindan komprenemon kaj mondkonsecan spiriton. Ni gratulas lin ankaŭ ĉi-loke kaj deziras al li sukcesan daŭrigon de sia valoro laboro.

Niaj Honoraj Kolonoj

Dankema gratulo al niaj kunlaborintoj kaj jubileantoj

Niaj legantoj jam legis la detalan raporton pri la bele sukcesintaj festoj, kiuj okazis dum du tagoj en Antverpeno, okaze de la Ora Jubileo de Reĝa Belga Ligo Esperantista.

En ĝi aperis nomoj nur de personoj, kiuj preparante, parolante, teatroludante, kantante, iel kunlaboris al la ĝenerala sukceso.

En tiu ĉi numero kontraŭe, ni volas honorigi tiujn, je kies honoro estis organizataj tiuj festoj: niajn kunlabo-

rintojn de la unua ĝis la lasta horo en tiu unua duonjarcento; niajn veteranojn, esperantistojn de antaŭ almenaŭ 40 jaroj, kaj niajn jubileantojn, fidelajn membrojn de la Ligo dum almenaŭ 25 jaroj.

Ĉi sube, — en unua honora kolono, — oni trovos la nomojn de ĉiuj estraranoj, kiuj, — en la daŭro de 50 jaroj —, funkciis kiel prezidanto, vicprezidanto, ĝenerala sekretario kaj

kasisto.

Aldone al ĝi, ni presigas ankaŭ la nomojn de tiuj, — nun ankoraŭ membroj de nia Ligo —, kiuj akiris la diplomon pri Profesora Kapableco kaj, plej grandparte — per multaj kursoj gviditaj en siaj lokaj grupoj —, alportis al ili do samtempe al la Ligo, la ĉiam novan sangon, kiun ambaŭ daŭre bezonas.

Al ĉiuj iru nia dankema gratulo!

LA ESTRARO DE BELGA LIGO ESPERANTISTA

Prezidantoj:

S-ro Komandanto Charles Lemaire 30-7-05/20-9-08
S-ro Amatus Van der Biest 25-10-08/8-10-11
S-ro A. J. Witteryck 8-10-11/6-6-27 (*)
S-ro Frans Schoofs 6-6-27/12-3-34 (*)
S-ro Paul Kempeneers 21-10-34/16-1-54
S-ro Maurice Jaumotte 16-1-54

Vicprezidantoj:

S-ro Amatus Van der Biest 30-12-06/25-10-08
S-ro Lucien Blanche 30-12-06/20-9-08
S-ro A. J. Witteryck 25-10-08/8-10-11
S-ro Abato Richardson 25-10-08/20-8-13
S-ro L. Delvaux 8-10-11 ĝis la milito
S-ro Léon Cogen 1920/21/25-4-37
S-ro Paul Kempeneers 6-6-27/21-10-34
F-ino Yvonne Thooris 1935/7-4-46
S-ro Maurice Jaumotte 25-4-37/16-1-54
F-ino Antoinette Jennen 7-4-46/22-11-48
S-ro André Tassin 24-4-49/1-9-51
S-ro Jozeph Soyeur 16-1-54

Ĝeneralaj Sekretarioj:

S-ro Maurice Seynave 20-7-05/30-12-06
S-ro Jos. Jamin 30-12-06/20-9-08
S-ro Léon Champy 25-10-08/16-8-13
S-ro Henri Pétiau 17-8-13/27-4-36
S-ro Maurice Jaumotte 31-5-36/15-5-37
S-ro Charles Poupeye 25-4-37/7-4-46
S-ro Clotaire Vandeveld 7-4-46/1-12-51
S-ro Henri Sielens 8-3-52

Estis elektataj por kelka tempo „sekretarioj”: S-ro Dechesne kaj Swinne, en 1937; Verdier, en 1949, kaj Soyeur, en 1952.

Kasistoj:

S-ro J. Coox 30-12-06/18-10-08
S-ro Oscar Van Schoor 25-10-08/27-11-10
S-ro L. Delvaux 27-11-10/8-10-11
S-ro Fernand Mathieux 8-10-11/28-4-29
S-ro Maurice Jaumotte 28-4-29/25-4-37
S-ro André Tassin 25-4-37/24-4-49
S-ino Julia Plyson 24-4-49/16-1-54
S-ro Henri Sielens 16-1-54

Ekde 1948 S-ino Plyson funkciis kiel help-kasistino

Niaj diplomitaj Profesoroj:

Dum la unua duonjarcento, estis 101 kandidatoj, kiuj sin

*) Dum la lastaj jaroj de la prezidanteco de S-ro Witteryck kaj de la morto de S-ro Schoofs ĝis la elekto de S-ro Kempeneers, funkciis kiel prezidanto la vicprezidanto Cogen.

prezentis al la ekzameno kaj akiris la diplomon pri Profesora Kapableco:

Antverpeno: 38 diplomoj
Gento: 37 diplomoj
Bruselo: 15 diplomoj
Bruĝo: 4 diplomoj
Lokoj diversaj: 6 diplomoj
Eksterlando: 1 diplomo

Entute: 101 diplomoj
al kiuj oni aldonu: 9 diplomoj „pro Honoro”
Kune: 110 diplomoj

El tiuj 110 diplomitoj, 16 estas nun ankoraŭ vivantaj kaj membroj de Reĝa Belga Ligo Esperantista:

1908: F-ino Maria Posenae (S-ino Elworthy) - Antverpeno
S-ino Félicie Staes-Vandevoorde - Bruselo
1909: S-ro Jan Jacobs - Antverpeno
1910: S-ro Fernand Mathieux - Bruselo
F-ino Yvonne Thooris
1912: F-ino Juliette Nachtergaele - Gento
1914: S-ro Gustave Vermandere - Gento/Antverpeno
1920: S-ro Clotaire Vandeveld - Gento
1922: S-ro Morris De Ketelaere - Antverpeno
S-ro Maurice Jaumotte - Antverpeno
F-ino Simone Obozinski - Bruselo
1928: S-ro Maurice Boeren - Antverpeno
S-ro Paul Kempeneers - Bruselo
1935: S-ro Hector Boffejon - Antverpeno
S-ro Henri Sielens - Antverpeno
Jules Alofs - Bruselo

La 9 diplomoj „Pro Honoro” estas donacitaj al:

2/2/09: S-ro Frans Swagers - Antverpeno
S-ro Ad. Finet - Antverpeno
27/2/10: S-ro J. Parotte - Verviers
D-ro Willem Van der Biest - Antverpeno
26/5/12: Abato A. Richardson - Bruselo
S-ro L. Delvaux - Charleroi
S-ro F. Wagner - Charleroi
S-ro Oscar Van Schoor - Antverpeno
S-ro Frans Schoofs - Antverpeno.

**

HONORA KOLONO DE VETERANOJ KAJ JUBILEANTOJ

Ne ĉiuj niaj veteranoj estis daŭre membroj de nia Ligo. Iuj aliĝis al la Ligo nur post kelkaj jaroj aŭ eĉ multaj jaroj. Alij forlasis la Ligon dum mallonga aŭ kelkfoje longa periodo. Sed

La Statuto de U.E.A.

Kiel oni scias, R.B.L.E. voĉdonis kontraŭ la statutsango de U.E.A. kaj tiu ĉi statutsango estis malakceptata.

R.B.L.E. ne tiel agis, ĉar ĝi estas kontraŭ ĉiuj sangoj; sed precipe, — se ne nur, — ĉar oni volis devigi la Ligojn voĉdoni per nur unu vorto „Jes” aŭ „Ne”, rilate al ĉiuj antaŭviditaj sangoj, dum la diskutoj, kiuj ekestis, abunde pruvas, ke ne ĉio en ili estas bona aŭ dezirinda.

Voĉdonante kontraŭ la sangoj, la celo de R.B.L.E. estis haltigi la sangojn dum momente kaj devigi do la estraron al rekonsidero de la tuta afero kaj al serĉado de arango, kiu povos kontentigi ĉiujn. Tia grava sango efektive ne devas esti akirata plimulto kontraŭ malplimulto, sed, en serena atmosfero, kiu permesos akiri kvazaŭan unuanimecon.

Tiun celon nia Ligo, kun kelkaj aliaj, atingis... Sed nun oni devas rekonsideri la aferon... Tio estas ankaŭ la konkludo de la artikolo, kiun ni represas ĉi antaŭe kaj kiu estas skribita de membro de nia frata nederlanda Ligo L.E.E.N., kiu voĉdonis por la sango, dum „Flandra Ligo”, — same kiel R.B.L.E., — voĉdonis kontraŭ. Tiu artikolo permesos al la legantoj havi pli klaran ideon pri tiu problemado de la statutsango de U.E.A.

(Noto de la Liga Prezidanto: Sed ni ne kredas, ke la voĉdono, fare de 14 komitatanoj de U.E.A., de tagordo kontraŭ tri kolegoj, kiuj laŭ ĉiuj agis „strange”, laŭ aliaj „kuraĝe”, estas LA rimedo por atingi... reciproke komprenon!).

Nia Ekspozicio

Dum la jubileaj festoj estis organizata, en la Marista Domo, interesa ekspozicio kun multaj fotografaĵoj, al kies instalado kaj forpreno helpis, krom jam cititaj kunlaborintoj, F-ino H. Hofkens kaj Cl. Peeters. Rilate al tiu ĉi ekspozicio okazis konfurso, kies laŭreatino estas F-ino S. Obozinski, el Bruselo, kiu akiris la premion.

La organizo de tiu ĉi ekspozicio donis al la Komitato de „La Verda Stelo” la ideon krei daŭran ekspozici-materialeon, ne nur retrospektivan pri tio kio iam okazis: sed ankaŭ kaj precipe propagandan.

Tiun ĉi Ekspozici-materialeon la Grupo intencas uzi ne nur propracele, sed ankaŭ meti je la dispo de la Ligo, kiam ĝi iniciatos iom grandskalan propagandon.

Ni gratulas niajn antverpenajn amikojn kaj esperas ke ili, en baldaŭa estonto, povos realigi sian ideon.

Tiuj, kiuj posedas materialeon, kiu povus esti uzata ĉe la kunmeto de tia ekspozicio aŭ havus ideojn pri ĝia organizo, skribu al la sekretario de la Grupo: S-ro Jules Verstraeten, Portugesestraat, 69 Hoboken.

Maurice Jaumotte kaj Morris De Ketelaere (1917)

37 jaroj: F-ino Alice Boereboom kaj S-ro Charles Poupeye (1919)

36 jaroj: S-inoj Marguerite Jaumotte-Loquet, Lucette Faes-Janssens, Marguerite Vandeveld kaj Brigitte Van Wansseele kaj S-roj Aug. Faes, Jules Derweduwen kaj S-ro Maurice Daems (1920)

35 jaroj: S-inoj Gabrielle Simons-Van Herendael (1921) kaj F. Staes-Vandevoorde (1905, kun interrompo). S-roj Léon Schoofs (denaskiĝa), Louis Everaerts kaj Henri Hart (1921)

34 jaroj: S-roj Hector Vermuyten kaj Maurice Boeren (1922)

33 jaroj: S-ino Marguerite Algrain-Coucke kaj F-ino André Algrain (1923)

32 jaroj: S-ro J. Soyeur (kun interrompo) kaj S-roj Jos Moerenhout kaj Frans Deman (1924)

31 jaroj: S-ino Alice Stroobandt-Victor, F-ino Maria Jacobs kaj S-ro Lode Bas (1925)

30 jaroj: S-ino Blanche Vermuyten-Lacroix, F-ino Yv. Van der Veken, D-ro P. Kempeneers, D-ro Raoul Maes-Dubois, S-roj Marcel Roost, Hector Castel, August Stroobandt kaj René Rosseel (1926)

29 jaroj: S-inoj Diny Kempeneers, Jeanne De Hondt-Hubens, Lucy Castel, Hélène Moens-Verlè, F-ino Maria Verbeke kaj S-roj Henri Van Roye, Raymond Brihay kaj Louis Genin (1927)

28 jaroj: S-inoj Livine Merckx-Herinx, Alexandrine Bolsius-Deneer kaj Andrée Herion-Gathy, D-ro Alfons Christiaens kaj S-ro Etienne De Craecke kaj Edmond Patiny (1928)

27 jaroj: S-inoj Elly Staes (kun interrompo) Gabrielle Poupeye-Henderyckx kaj Marguerite De Baets-Huyghe kaj S-roj Hector Boffejon, Georges Van den Bossche, Karel kaj Jozef De Coster, S-ro Roger Jaumotte (denaskiĝa) kaj S-ino Marg. Daems

26 jaroj: S-inoj Angèle Gruslet kaj Marguerite De Rycke, F-ino Marguerite Claeysens, S-ro Jules Alofs (veterano, aliĝinta nur en 1930), S-roj Leon Braet kaj Jacques Timmermans (1930)

25 jaroj: S-ro Henri Sielens kaj Arthur Claes (1931) kaj S-roj Félix Swinne, Antoine Laurent, René Demot kaj Victor Lamberts (almenaŭ 25 jaroj).

Pro miskompreno, la presisto jam presigis kvar pagojn de nia revuo, antaŭ la tradicia „aprobatur”.

La sekvo estas ne nur iom stranga divido de la pagoj, sed ankaŭ ke, sur la unua pago, estas presita artikolo pri „La Statuto de U.E.A.”, de nederlanda samideano, SEN la teksto, kiun ni nepre deziris antaŭmeti al ĝi, pro la fakto, ke ni ne plene konsentas pri ĉiuj detaloj de tiu artikolo, kiun ni publikigas precipe ĉar ĝi donas alian starpunkton, ol tiu, kiun alprenis nia Komitatano en U.E.A. kaj la Estraro de R.B.L.E.

Ĉiuj cititoj estas nun ankoraŭ membroj de la Ligo.

Niaj Veteranoj

Esperantistigis:

En 1902: S-ro François Verbanck
En 1905: S-inoj Félicie Staes-Vandevoorde kaj Elly Staes kaj S-ro J. Alofs
En 1906: S-ino Maria Elworthy-Posenaer kaj F-ino Yvonne Thooris
En 1907: S-ro Jan Jacobs
En 1908: S-ino Georgine Pierre-Gamal kaj S-roj Jos. Soyeur kaj Jos. Derks
En 1909: S-inoj Pélagie Derks-Louyet kaj Bertha Jacobs-Vanderstegen
En 1910: S-ro Willem Dollez
En 1911: F-ino Juliette Nachtergaele kaj S-roj Fernand Mathieux kaj Gustave Vermandere
En 1912: F-ino Simone Obozinski
En 1913: S-roj Achille De Martelaere
En 1915: S-roj Clotaire Vandeveld kaj S-ro Jos Héron.
En 1916: S-ro Maurice Daems

Niaj Jubileantoj

Malgraŭ la fakto, ke la Ligo ekzistas nur de 50 jaroj, la nuna 1955 estas tamen jam la 51a kasista jaro.

Estas do membroj:
dum 51 jaroj: S-ro François Verbanck
50 jaroj: S-ino Maria Elworthy-Posenaer kaj F-ino Yvonne Thooris
48 jaroj: S-ro Jos. Derks (1908)
47 jaroj: S-ino P. Derks-Louyet (1909)
45 jaroj: F-ino J. Nachtergaele kaj S-roj F. Mathieux kaj G. Vermandere (1911)

44 jaroj: F-ino S. Obozinski (1912)
43 jaroj: S-ro A. De Martelaere (1913)
41 jaroj: S-roj Cl. Vandeveld kaj J. Héron (1915)

39 jaroj: S-ino Henriette Schoofs kaj S-roj

BIBLIOGRAFIO

BONGUSTA POEZIA CIGAREDO EN ORIGINALA ENPAKAJO

POUL THORSEN. - ROZOJ KAJ URTIKOJ - kun antaŭparolo de W. AULD, vinjetoj de BOERGE HAMBERG, biografiaj notoj, indiko pri komponistoj kaj vortklarigo. - 117-paĝa poemaro bindita. Eld. *Komuna Konversacia Klubo*, Randbölvej 4, Kopenhago. - Prezo: 75 b.fr.

La valora eldono de pluraj ampleksaj antologioj, kiuj eĉ interesis ne-esperantistajn bibliotekistojn, pruvanta nian forton inter la du militoj, bedaŭrinde interrompigis. Kiam ni ekposedos ekz. la *nederlandan*, kiu prespreta ŝajne perdiĝis malantaŭ la fera kurteno? Mankas i.a. la *dana*, kvankam ankaŭ en Danujo ne mankas tre kapablaj tradukantoj, kiel ree montriĝas per „*Rozoj kaj Urtikoj*”, kiu — almenaŭ por la poezio-jam prezentas interesan kolekton (36 lerte tradukitajn versaĵojn).

Estas kliŝa konstatado, ke la mondo ne multe scias pri la literaturo de malgrandaj popoloj. La Danoj, volonte kulturante la aferojn de la spirito, tamen posedas riĉan beletristikon, kiu fakte komenciĝis kun *L.Holberg* (1684-1754), plene reviviĝis ĉirkaŭ 1870 sub gvido de *Georgo Brandes* kaj kies liriko atingis altan nivelon.

La tradukinto esperantigis versojn de 5 poetoj, naskiĝintaj en la 18a jarcento, krom i.a. poemojn de la lirikisto *J. Aakjaer* (1866-1930), disĉiplo de *Burns*, pentristo de la jutlanda melankolie bela pejzaĝo, kiu verkis plej elstare en sia dialekto; de la Nobel-premiito *J. V. Jensen* (1873-1950), majstro de universaleca liriko kun nacia stampo, kun delikata, rafinita sentemo; kaj *T. Kristensen* (1893) lingva virtuozo post li, kiu kun *H. H. Seedorf* (1892) enkondukis la ekspresionismon en la danan poezion. De tiu ĉi relegendas la en Harlemono premiita *Leprulo*, kies fortan tradukon ni jam aliloke ĝuis.

Estas malfacile al eksterstaranto ĵuĝi ĉu la elekto de la poezioj ne tro influis la persona gusto de la tradukinto, ĉi-kaze lia ŝajna prefero por formebleco kaj venkindaj malfacilaĵoj, pri supozita internacia interesiĝo (alilandaj kaj gajaj, subtila pikantaj temoj). Ne estas reprezentita ekz. la ĉe ni plibone konata *J. Joergensen*, profesoro dum 1913 ĉe la lomena universitato, kiu ankaŭ publikigis poemarojn kaj konsistigas religian elementon en sufiĉe skeptikisma literaturo. Sed ni atendu la kompletan antologion pri kiu oni en Danlando revas...

Nu, talenton laŭ propra spirito montras 30 originaloj, inter kiuj pluraj porcirkonstancaj kaj premiitaj, kiuj sekvas la tradukojn, kiel en la pionira

tempo, sed tiam en modestaj, eĉ mizeraj eldonoj, kaj nun en plaĉa sur bona papero kaj zorgita tipografio, kun rimarkindaj vinjetoj. Verdire ili ne estas nur „urtikoj” sed estetikaj produktoj de ludema norda intelekto kun sufiĉe suda temperamento, kiu siavice, post la milito, pilgrimis al Budapeŝto kaj de tie kunportis, krom nura lerteco (soneteto „Kismiso”) artisman kaj amon pri formtekniko (soneto, rimportreto, ritornalo, rondelo, lime-riko) Liaj propraj „rondeloj” (plidecaj) honore enŝoviĝis inter la tradukitajn de la dana erotikulo *Aarestrup* (1800-1855).

Eternos mia am', elkriis Klara, versante akvon en la florovazon. Versujo flustris: Falas Niagara. (A.)

Knabin! Eternas mia korinklino, deklamis li (plej tede forgesante ke junu ino; oldu nur la vino.) (T.)

Pardonu, ĉiuj taftaj, delikataj kaj alispecaj ino-vestpecetoj, kiuj postnokte trovis sin taŭzataj. (A.)

Aĉetis robojn, peltojn ŝi plej koste. Por vesti ŝin kaj amuzadi poste nudigis multaj viroj sin ĝisoste. (T.)

Thorsen estas sprita, distingiga apere, kies facilanima sed disciplinita mazo, nur esceptokaze iomete ĝenata de trostreĉe laĉita korseto, igas pintigi la lipojn je spirita rideto. Liaj versoj atestas pri „poeta sentemo pri sia instrumento, la lingvo” (Auld), — (*Tra blanke kovrita kvadrato/barak-tas lanterno barita*) — eĉ kiam li „ŝvarcas”. Oni komparu ekz. „*Kapriculino*” kaj „*La Mondpacigilo*” kun identaj, plirektaj sed pli nudaj, el „*Verdkata Testamento*” de antaŭ tri dek jaroj. Iom post iom ni plinuance perceptas la sent-kaj kolorvaloron, la sugestian forton de la juna esperanta vorto (kaj ni ne aludas la neologismon) kiu fakte ne ankoraŭ ĝisefibre penetris „la bonan esperantiston”. Iu tia, haltinte sur la vulgara plano, ĉe la insulta „ŝprucekulo” en traduko de grenlanda versaĵo, ja konfesis al ni, ke tiu... nepoezia fakvorto, trapasinte lian menson, nur efikis kiel dekok-taĵo de nacilingva kaj ne sincere ek-kolerigis lin!

Ni scias, ke la poezio, eĉ ne la bonhumora de *Thorsen*, baldaŭ iĝos la tabako de la plimulto, sed la koncerna poeto sendube ofertas al bongustamaj palatuloj cigaredon bonkvalitan, ĝuotan dum kelkaj minutoj sen grava emocio, sed pri kiu ili zorge notos la markon por posta okazo.

Tyneverum.

LA ORA JUBILEO

Hej, la liĝo jubileas:

la kroniko-epopeas

kaj torento da medaloj.

traftalento de metaloj,

rekompencas penlaboron.

Kondolencas mi l' fervoron

de mortintaj pioniroj,

Stelportintaj ĝoj-martiroj,

glutgratulas al la vivaj

kaj okulas al aktivaj,

kun sur kapoj lumostriaj,

Stelcfrapoj emociaj.

El hoteloj mi gustumas

sed la Steloj plue lumas.

Idealoj labirintus,

se medaloj ne gajintus...

Tyneverum

El la Flandra Poezio

Kun mia herediga onklo en la banka kelo

Marnix Gijsen (1899)

(D-ro A. J. Goris)

Maliuna onklo. Mi l' heredonto.

Li estas ia bona sed lia respondo

frostfrapas kiel venĝem', malam'.

Ni kune iris al la banko.

La tramvoĉoj estis agrabla kanto

al mi.

Ĉar mi enamigis pli

gajis ol edzineto en nova dom'.

La lumoj akris en kelo de l' mon'.

Kun metala ŝovson'

apertiĝis la vand'.

Akciojn po kvant'

transdonis por nombri malgrasa mano:

„Ekmortes mi baldaŭ”. Kvazaŭ romano...

Li detranĉis kuponojn. Mi ordigis kun ĝen'.

Sentiĝis neesprimebla ĉagren'.

Pensoj kiel flagoj en pluvo pendis.

Li tasis, pesiĝis juvelojn, silentis.

Mi rotis: estis postlasoj donacaj.

Liaj haroj estis tiel grizaj kaj lacaj.

Enpensiĝe li montris al sia testament'

per mano grizbruna, kolor' de cement'.

Li estis la Faraono tombovizita

antaŭ ol ties piramido finkonstruita

tranĉis horizonton per sia anĝel'.

Li ne parolis. Lia buŝo acida

strekis fermata.

Li metis, lacul'.

la piedon, kvazaŭ pezan fosilon,

sur ŝtupojn el fer'.

Mi sekvis lin preskaŭ en plor' al ekster'.

trad. H. Vermuyten

ESPERANTO-ENIGMOJ

Premion akiris post n-roj 183/184: s-ro P. H. Mooij, el Bruselo, por V.E.B.

SOLVOJ

185. marodi, diareo, radiko, kiraso, skalpo, paliso, aspiro, pastro, sprita, sperta, pasero, ansero, panero, ekra-no, rikano, lariko, razilo, armilo, marodi.

186. Hor.: movig, krani, are, laŭr, vek, normo, adept, gabardin, iris, kudr, elit, ebla, fifr, fand, radiator, stadi, anemi, arm, kugl, sav, debut, putri.

Vert.: manki, fasad, oro, rabi, tre, vergi, framb, maskerad, glob, dikt, avel, laca, krad, talp, diktafon, avenu, arest, nep, dign, mar, ikter, drivi.

187. ĈENO.

Trovi 20 trisilabajn kaj samtempe sesliterajn vortojn kiuj formas ĉenon, tiel ke la dua silabo de ĉiu vorto fariĝas la unua silabo de la sekvanta vorto. La meza silabo de la lasta vorto egalas la unuan de la unua vorto.

Difinoj: 1. vesto; 2. preĝlibro; 3. intence difekti; 4. vitra ujo; 5. suketo sur gramofondisko; 6. entrepreno kies celo estas mona profito; 7. simio; 8. rebonigi; 9. subita teruro; 10. speco de artefarita silko; 11. arbo, kies fruktoj forgesigis la patrolandon al tiuj, kiuj ilin mangis; 12. ĉion ampleksanta; 13. teksaĵo kovranta meblon; 14. sonprenilo; 15. remburita sako; 16. laŭleĝa izoligo; 17. tabuleto de rado de radŝipo; 18. devenigi vorton de alia; 19. nefleksebla; 20. fenestreto en vando por pasigi ion.

188. KRUCVORTENIGMO.

Horizontale. 1. teatra prezentado en la posttagmezo(R). 2. speco de motorciklo(R). 3. mamulo kiu vivas pendante sub arbobranĉoj(R). 4. komenciĝi; karteto sur objekto por indiki ĝian prezon(R). 5. tersurfaco(R). 6. rondo(R); floro(R). 7. prefikso. 8. malsano malfaciliganta la spiradon; kromsigno sur la notliniaro(R). 9. ĝi streĉas la ŝtrumpojn(R). 10. influi per-

1 2 3 4 5 6 7 8 9 10 11

1											
2											
3											
4											
5											
6											
7											
8											
9											
10											
11											

Verdlando Vokas

Listo de radiodissendoj en aŭ pri Esperanto. Tempindiko: M.E.T. (= mezeŭropa tempo) valida ankaŭ en Belgujo, Nederlando kaj Svisujo. Mallongigoj: I = informoj. P = paroladeto. K = kurso. M = muziko.

LUNDE:

13.30—14.00 La Coruna (Hispanujo), 250 m.: P kaj K.

23.45—24.00 Hilversumo II, 298 m., 188 m., N.C.R.V.: P kaj M (nur la unuon lundon de ĉiu monato; 7-III-1955 k.t.p.)

MARDE:

12.55—13.00 Berno, 31,46 m., 48,66 m., 16,87 m.: P de d-ro A. Baur.

15.30—15.45 Montevideo (Urugvajo), 280 m.: P (nur la unuan mardon de ĉiu monato).

15.50—16.00 Ljubljano (Jugoslavujo), 327 m., 211,4 m.: K.

18.35—18.40 Berno, 25,61 m., 31,46 m., 48,66 m.: P kiel 12.55.

19.15—19.30 Carlet (Hispanujo), 288 m.: I.

MERKREDE:

16.30—16.40 Vieno II, 25 m., 30 m., 41 m., 48 m., 203 m.: P. (Nur ĉiudusemajne; 9-III-1955 k.t.p.)

17.00—17.10 Caramulo (Portugalujo), 206 m.: P de Alfred Sales.

18.50—19.10 Romo, 31,33 m., 49,92 m.: P de Luigi Minnaja.

23.05—23.15 Vieno I, 25 m., 48 m., 530 m.: I.

23.15—23.20 Hilversumo I, 402 m., V.A.R.A.: I.

JAŬDE:

07.45—07.50 Perpignan-Rousillon (Francujo), 202 m.: K de R. Liech Walter kaj R. Gendre.

09.30—09.40 Parizo, 348 m., 218 m.: K. de Pierre Delaire.

12.55—13.00 Berno, 16,87 m., 31,46 m., 48,66 m.: P de prof. d-ro Edmond Privat pri: „Esperanto-ideologio”.

18.35—18.40 Berno, 25,61 m., 31,46 m., 48,66 m.: P kiel 12.55.

23.45—24.00 Zagreb (Jugoslavujo), 264,7 m.: P.

VENDREDE:

18.50—19.10 Romo, 31,33 m., 49,92 m.: P de prof. d-ro V. Musella.

19.15—19.30 Carlet (Hispanujo), 288 m.: I.

22.30—22.45 Gvatemalo, 30,50 m., 47 m., 197 m., 470 m.: I.

SABATE:

09.30—10.00 Rio de Janeiro, 30,71 m., 375 m.: K. kaj I.

18.45—19.00 Barcelono (Katalunujo), 360 m.: I kaj K.

23.15—23.20 Hilversumo II, 298 m., 188 m., K.R.O.: I.

Informoj kaj petoj:

Radio Roma. — Jen detaloj pri la programo en marto 1955: 2: Mondo Esperantista. 4: Leterkesto kaj bibliografio. 9: Informoj el Italujo. 11: Datreveno de la naskiĝo de Torquato Tasso (11/III/1544). 16: Festivalo de la itala kanzono en San Remo. 18: Revenis printempo. 23: Florenco, urbo de artistoj kaj poetoj. 25: La „Anunciacio”. 30: Gastronomio Bolonjo. — Atentu jam nun, ke la 1-an de aprilo 1955 okazos la kvincenta jubileo dissendo. Ne forgesu sendi gratulon al Radio Roma, Esperanto-fako, Casella Postale 320, ROMA (Italujo).

Radio Zagreb. — Atentu pri la pli frua komenco de la Esp.-programero de ĉi tiu stacio, kiu estas klare aŭdebla en nia lando. Dankon al s-ro A.A.L. en Bussum pro la entuziasma letero, kiun ni sendis al Zagreb. Ankaŭ ni mem 27/II/1955 klare aŭdis, ke dana muzikistino (f-ino Trerup?) estis intervjuata de la jugoslava anoncisto. Kian internacian rondon ili formis kun la diversnaciaj geaŭskultantoj!

Al s-ro L. v. d. E., Hemiksem (Belgujo). — Dankon pro via longa letero. Ne nur vi kaj ni, sed ankaŭ aliaj gesamideanoj deziregas plilongigon de la Esperanto-programermetetetoj. La sola rimedo estas amase konigi tiun deziron al la koncernaj stacioj. Per la papera kanono ni pafu breĉojn en la muroj de indiferenteco, kiuj ĉirkaŭas plurajn radio-oficialulojn. Ni uzos por tiu celo vian leteron.

Informoj pri Esperanto-radio-dissendoj sendu ne nur la radiostacioj, sed ankaŭ la radio-geaŭskultantoj al: S. S. de Jong Dzn, Radio-Servo N.C.K.E., Waltweg 3, TIERKWERD bij BOLSWARD (Frislando), Nederlando.

sonon per karesaj agoj por atingi ion de ĝi; 11. parto de floro(R).

Vertikale. 1. kvalito(R); 2. tranĉe; starigi ion por ke ĝi bone funkcii(R); 3. havigi al si(R); 4. meriti; ŝargauti(R); 5. prepozicio. 6. kredi, ke tio, kion oni deziras, realiĝos(R); speco de aŭtomobilo(R). 7. duonvarma. 8. estrado(R); parto de okulo(R). 9. fari trikotsimilan ŝtofon per stangeto kun

hoketo ĉe unu ekstremaĵo(R). 10. ne-atendite morti per akcidento(R); kunsida periodo de parlamento(R). 11. flosi laŭ la puŝo de la fluo(R).

La solvojn sendu la nederlandanoj al s-ro G. J. Teunissen, Burg. Tellegenstraat, 21 hs., Amsterdam-Z.; la membroj de F.L.E. aŭ R.B.L.E. al s-ro F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge, antaŭ la 20/III/1955.

BELGA KRONIKO

Prezidanto: S-ro Maur. JAUMOTTE, De Bruynlaan, 44, Wilrijk.
Vicprezidanto-Kasisto: S-ro J. Soyeur, 91, Rue du Chêne, Seraing.
Ĝenerala Sekretario: S-ro H. Sielens, „Internacia Marista Domo“, Falconrui, 21, Antverpeno.
 (Poŝtĉeknumero: R.B.L.E.: 13.37.67)

La Flegado de nia Kaso

Pro la ekŝigo de S-ino J. Plyson, kiel kasistino, en la komenco de pasinta jaro, estas nia ĝenerala sekretario, S-ro Henri Sielens, kiu flegas nunmomente nian kason.

Dum ĝia ĵusokazinta kunsido, pri kiu ni cetera raportos en nia proksima numero, la administrantaro de nia Ligo decidis ke, estonte, estos nia vicprezidanto, S-ro Joseph SOYEUR, 91, rue du Chêne, SERAING, kiu ĝin prizorgos.

Oni sin do, ekde nun, turnu al li pri financaj aferoj.

Danke tamen la Ligeŝtraro ricevos proponon pri kandidateco de iu kiu, tut-aparte de alia posteno en la estaro, - bonvolos helpi, iĝante la oficiala kasisto de nia Ligo.

Ni aldonu, ke S-ino J. Plyson daŭrigos la prizorgadon de la financaj aferoj, kiuj rilatas al la universala kaj beneluxa kongresoj.

ANTVERPENO

Esperanto-Grupo „La Verda Stelo“

(Poŝtĉeknumero: 726.54)

Post du senkunvenaj vendredoj, la Prezidanto eldiris la 7an de januaro la tradiciajn bondezirojn al ĉiuj membroj, kiuj multnombraj ĉeestas por la parolata jurnalo.

La 14an okazis la ĝenerala jarkunsido, dum kiu la prezidanto dankis kaj gratulis ĉiujn, kiuj helpis al la plivigligo de la grupa vivo dum la ĵusfora jaro. La sekretario, S-ro J. Verstraeten kaj la kasisto S-ro R. Balleux prezentis siajn raportojn. La honorigo de la jubileantoj estis prokrastata ĝis la baldaŭ okazantaj festoj de la Ligo.

La 21an S-ro Montmirail enkondukis debaton pri „Ĉu alta aŭ malalta Domkonstruo“. Li sukcese tion faris, ĉar lia vidpunkto kondukis al tre vigla debato.

La 28an, estis antaŭvidata kabaretvespero sed kun speciala numero: diplomdisdono al la ĝelernintoj de la unua vintra kurso. Dek ĝelernintoj sukcesis en sia ekzameno, nome: S-roj Fl. Wernaers, W. Simon, Fr. Bruyninx, K. Lambrechts, P. Schoonbaert, G. Bastien, C. Vinck, F-inoj J. Aters kaj H. Vos kaj S-ro H. Vanhelmond, al kiuj la Prezidanto direktis plej varmajn komplimentojn kaj donis konsilojn pri daŭrigo de la studado. S-ro K. Lambrechts, nome de ĉiuj, dankis la prezidanton por la gratulaj vortoj kaj F-inon Henny De Ketelaere, la profesorinon, por la sindono. Tiu ĉi, siavice, esprimis sian kontentecon pri la evoluo de

la kurso.

Poste sekvis la kabareta parto, al kiu partoprenis F-inoj M. Ameryckx, H. Hofkens, Cl. Peeters kaj Lea Vinck, S-ino Pauline Tytgat kaj S-roj K. Ameryckx, W. Desroisy, A. Verhoeven kaj J. Verstraeten.

La 4an de februaro, denove okazis parolata jurnalo kaj la 11an, — antaŭvespero de la Ligaj Jubileaj Festoj —, estis priparolataj la lastaj aranĝoj.

En la sabata festkunsido de la Grupo, dum tiuj ĉi jubileaj festoj, medalojn kaj stelojn akiris diversaj membroj, kies nomoj ni publikigos en nia proksima numero.

La 25an de februaro, S-ro Advokato Guy Coopman paroladis pri „La Eŭropa Movado“ kaj pledis por la kunigo de la eŭropaj ŝtatoj. Li skizis la ekeston kaj la diversajn klopodojn por ĝin atingi, menciis la jam akiritajn rezultatojn kaj konkludis per deziresprimo ke Esperanto iĝu la oficiala lingvo de la estonta Eŭropo. La prezidanto dankis kore kaj multaj interesitoj havis tiam la okazon peti pliajn detalojn pri iuj punktoj pritraktitaj. Belega filmo de K.L.M. pri Eŭropo la bela konkludis tiun ĉi bonegan vesperon.

Kaj la 4an de marto okazis parolata jurnalo, kun speciala enkonduko de S-ro Vander Schueren, kiu, kun lumbildoj klarigis diversajn artaĵojn.

Programo de la venontaj kunsidoj

Ĉiuvendrede en „Witte Leeuw“, Frankrijk 4, je la 20.30a h. (1-e etaĝo)

APRIL: la 1an: Parolata jurnalo; la 8an: (Sta. Vendredo). La Pasio en la Artoj; la 15an: Montro de filmo pri la Jubileaj Festoj (S-ro Montmirail); Lotumado de memfaritaj premioj, skatol- aŭ alifarmaj; la 22an: Priparolo de eventualaj kontraŭdiroj al Esperanto; la 29an: Debato: „La Modernismo en la Artoj“ (enkonduko de

Por sia vintra provizo

Por sia antracita karbo

la Esperantistoj mendas

ĉe

BELGOMINE

FRANKRIJKEI, 20

ANTVERPENO

kui donas specialan premion

La Beneluxa Esperanto-Kongreso en Utrecht 1955a

Ĝis la unua de februaro aliĝis:

de F.L.E.	14
de L.E.E.N.	82
de R.B.L.E.	48
entute	144

Estas nun tempo por ensendi aliĝilon kaj monon por tiu ĉi Kongreso, se ni volas faciligi la laboron kaj havi bonan loĝadon.

Oni sin turnu al S-ino Plyson, 185, rue Jourdan, Bruselo.

G. FAES

16, Schoenmarkt, 16

ANTVERPENO

Por via MUZIKO,
RADIO kaj GRAMOFONO

F-ino Bl. Geers)

MAJO: Aŭtoĉarekursuro estas antaŭvidata por la dimanĉo 8a.

Nekrologo

Dum la jubileaj festoj, subite mortis en Antverpeno S-ro Théophile Schoofs, frato de nia Liga prezidanto: bofrato de S-ino Henriette Schoofs; onklo kaj pranonklo de la ceteraj membroj de tiu ĉi esperanta familio.

Ni prezentas tiajn sincerajn kondolencojn al lia vidvino kaj al niaj karaj gemembroj.

BRUGO

Bruga Grupo Esperantista

(Poŝtĉeknumero 4835.23)

La unua numero por la nuna jaro de la parolata gazeto aperis la 11-an de januaro kun interesaj kontribuoj de S-roj: L. Van Wassenhove pri la „Brugaj Cignoj“ kaj Marcel Poupeye pri „Antaŭdiroj por 1955“, kaj de F-inoj: Is. Van Parijs pri „Fakira Miraklo“ kaj „Infano estas beno“, S. Manteleers pri: San Angelo kaj Yol. Van Parys pri „Humorajoj“.

La kunveno de la 18a de januaro estis ĉefe plenigata per interparolaj ekzercoj kaj tiu de la 25a per portretludado.

La ĝenerala jarkunveno de la grupo okazis la 1-an de februaro kun la kutimaj raportoj. La prezidanto, en sia morala raporto, substrekis la progreson atingitan dum la pasinta jaro kaj akcentis la necescon de la kunhelpo de ĉiuj membroj por akiri ankoraŭ pli entuziasmigajn rezultojn dum la nuna jaro. F-ino Is. Van Parys, sekretariino, raportis detale pri la grupa

BRUGGE BRUGES

Hôtel du Cornet d'Or

2, Simon Stevinplaats, 2

Centra situo - Moderaj prezoj

Moderna komforto

Sidejo de Bruga Grupo Esperantista.
Tel. 314.59

agado dum 1954a kaj F-ino Yol. Van Parys, helpa sekretariino, antaŭlegis la financon raporton, verkitan de la kasisto S-ro Schalembier, kiu pro malhelpo ne povis ĉeesti. Ĉiuj raportoj estis aplaudataj de la multnombraj ĉeestantoj, kiuj, post aprobo de la administrado dum 1954-a, je la propono de S-ro L. Van Wassenhove, reelektis la elirantan komitaton entute per novaj aplaŭdoj. Programo pri estonta agado estis detale priparolata kaj petoj kaj proponoj de la membroj estis zorge notataj por pli posta esplorado. La kunveno finiĝis iom pli malfrue ol la ordinara, sed en plej bona spirito.

Nova kurso malfermiĝis la 8an de februaro en la grupa sidejo. Ĝi estas speciale aranĝata por ke la kelkaj novuloj, kiuj enskribiĝis, akiru en ĝi elementajn konojn kaj por ke la lernintoj de antaŭaj kursoj trovu en ĝi perfektigan ripetadon. Ĝi okazas dum la unua horo de ĉiu marda kunveno. Estas do varme rekomendata al la lernintoj de antaŭaj kursoj, ke ili venu pliriĉigi siajn lingvajn konojn en tiuj por ili perfektigaj lecionoj.

La 15-an de februaro estis raportata pri la ĵus pasintaj Jubileaj Festoj en Antverpeno: ĉi partopreninto laŭvice pritraktis iun programeron kaj la entuziasmo de la raportantoj pruvis al la hejmrastintoj la grandan sukceson de tiuj festoj.

Dum la dua parto de la kunveno de la 22-a de februaro, la novaj ĝelernantoj estis enskretigitaj pri la ĝojoj de paroliga portretludado.

Kelkaj artaj diskoj pri belkanto, prunedonitaj de F-ino S. Manteleers, estis disaŭdigataj dum la muzika vespero de la 1-a de marto.

Ni aldonu ke malgraŭ sia peraplaŭda reelektado dum la ĝenerala jarkunsido, la Komitato tamen devis estis iom ŝanĝata pro la fakto ke S-ro H. Schalembier, pro

personaj malhelpoj, ne povis akcepti sian reelektadon kiel kasisto: sekve de tio la Komitato estas nun jene kunmetata.

Prezidanto: S-ro Charles Poupeye.
Vicprezidanto: F-ino Alice Boereboom.
Vicprezidanto: S-ro David Demeulenaere.
Sekretariino: F-ino Yolande Van Parys.
Kasistino: F-ino Isabelle Van Parys.
Konsilantino: S-ino Suzanne Verbeke-Vanden Berghe.

Programo de la sekvontaj kunvenoj

Ordinara kunveno: ĉiutage je la 20-a, en la sidejo: „Gouden Hoorn - Cornet d'Or“, Simon Stevinplaats, 2.

Dum la unua horo de ĉiu kunveno: Elementa kaj perfektiga kurso. Ankaŭ la malnovaj membroj ĉeestu tiun unuan horon.

Dum la dua horo:

Aprilo: 5-an: Parolado de S-ro Karlo Poupeye pri „Televido“. 12-an: Muzika vespero. 19-an: Debato: Multaj aŭ malmultaj infanoj. 26-an: Parolado de S-ro Leon Van Wassenhove, pri „La Lago de Amo“.

LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO

Tel.: 15.19.92

Entrepreno de

KONSTRUAĴOJ

BRUSELO

Esperantista Brusela Grupo

(Poŝtĉekkonto 12.30.48)

La 10-an de januaro okazis eksterordinare interesa prelego de S-ro D-ro R. Maes pri „Skotaj Klanoj“, kiu akiris grandegan sukceson.

La 17-an, estis la vico de S-ro Vander Stempel, kiu faris sian perfektigan kurson.

La 24-an, parolis S-ro H. Castel pri „Humorajo kaj Humoristoj“. La preleganto citis i.a. tekstpartojn el „Hamlet“ kaj el „David Copperfield“. Li rakontis anekdotojn pri Bernhard Shaw kaj Oscar Wilde, humorajon pri Napoleono, parolis pri famaj francaj kaj rusaj humoristoj kaj fine legis kelkajn paĝojn el verko de Colette.

La 31-an, okazis la ĝenerala jarkunsido, dum kiu S-ino Ernst, sekretariino, legis la

Por viaj esperantaĵoj, libroj, insignoj k. c.

Belga Esperanto-Instituto

26, Oostenstraat, 26
ANTVERPENO

kui ankaŭ havigos al vi nacilingvajn librojn, revuojn kaj gazetojn, kaj ĉiusecan skribmaterialon.

raporton pri la agado de la komitato dum la pasinta jaro kaj S-ino J. Plyson, kasistino, la financon raporton, kiu montras favoran saldon. Ambaŭ raportoj estis unuanime aprobat. D-ro Kempeneers, prezidanto, dankis la komitatanojn pro la agraba kunlaboro kaj voĉdonigis malsarĝon al la eksiganta komitato. En nia antaŭa numero ni jam publikigis la nomaron de la nova komitato, kiu estis elektata dum baloto kun 42 voĉdoniloj.

La 7-an de februaro, okazis la parolata gazeto kun multnombra partopreno kaj en kiu venkis S-ro Nelis kun „Pri Libereco“.

La 14-an, S-ino Elly Staes pritraktis „Gerswin kaj lia Muziko“ kaj agrabligis sian detalan paroladon pri la vivo de la artisto per gramofon-disko, i.a. „Simfonio en blua koloro“, „Toby kaj Bess“ kaj „Iu Usonano en Parizo“.

La 21-an, S-ro Vander Stempel faris sian perfektigan lecionon pri la reflektivaj adjektivoj.

La 28an, S-ino Ernst rakontis pri „la Interrompita Vojaĝo“, amuza aventuro en tueleto, kiu bonege finiĝas per ĝefianĉiĝo.

La 7an de marto la antaŭvidita mitul-vespermanĝo, bonege aranĝita de S-ro Swinne, akiris grandan sukceson kaj ĝin konkludis humorajoj kaj amuzaj kantoj de S-ro Piron.

Programo de la venontaj kunsidoj

APRIL: Lundo la 4an. Festkunsido: Transdono, fare de la Liga Prezidanto S-ro M. Jaumotte, — de la medaloj al la veteranoj kaj jubileantoj; la 11an (Paska lundo): ne okazos kunsido; la 18an: Perfektiga leciono de S-ro Vander Stempel; la 25an: Parolado de F-ino S. Obozinski pri „La Arbaro de Soignes“.

Ŝatas korespondi:

F-ino Yvonne Hohage, 28, rue Réaumur, PARIS 3e (Francujo) deziras korespondi kun samideanoj de nia lando. (komencantino)

S-ro André Beder, 47, Boulevard Voltaire, ASNIERES (Seine), Francujo (23-jara) deziras korespondi kun fraŭlino.

Verreries et Miroiterie DESMECHT & Co

LA LOUVIERE

S.P.R.L.

Tel. n-roj 223.01 - 223.37

Du esperantaj markoj:

TABULO, por lernejtubuloj; KATOKULO, por signalvitroj.

40a Universala Kongreso de Esperanto - Bologna (31/7 — 6/8/55)

Kara Samidean(in)o,
Jen sekvas kelkaj detaloj pri la ali-
go kaj vojaĝo al la 40-a U.K. en Bo-
logno.

KONGRESKOTIZO:

	ĝis la 31-3-55	poste
Kongresano 1)	f. 24.70	f. 29.50
Edzino 2)	f. 12.35	f. 14.75
Gejunuloj 3)	f. 8.20	f. 9.80
Studentoj 4)	f. 12.35	f. 14.75

- 1) Kongresano, estante individua membro de U.E.A. pagu f. 3.— malpli.
- 2) Edzino, ankaŭ membrino de U.E.A. havas rabaton de f. 1.50
- 3) Gejunuloj estas tiuj, kiuj ne havas pli ol 20 jarojn.
- 4) La speciala tarifo por studentoj validas nur, se kun la aliĝilo estas sendata atesto de lia/ŝia fakultato.

VOJAĜO

La intenco estas forvojaĝi en la 3-a klaso per vagonaro, kiu foriras de Rotterdam proksimume je la 18.45 je la 29-a de Julio.

Alveno en Bologno proksimume je la 17-a horo.

La partoprenontoj povos kapti la vagonaron en Rotterdam, Venlo, Eindhoven. Klare indiku sur la mendilo kie vi intencas envagoniĝi. Precizajn

detalojn vi post via aliĝo ricevos, ĉar la somera horaro povos ŝanĝiĝi la vojaĝplanon.

La prezo, kiu inkluzivas matenmanĝon kaj lunĉon, estas proksimume f. 149.00.

Al Bologno ni vojaĝu kune, la re-
envojaĝon vi povos fari kiam ajn. Tamen klare indiku sur la mendilo, ĉu vi tuj post la Kongreso jam reiros hejmen. Eble ni povos fari multe pli malmultekostan vojaĝon.

KONDIĈOJ POR LA PARTOPRENO

1. Pagojn oni nur faru je poŝtĉek-konto 2426-19 je mia nomo.
2. Oni uzu por aliĝo nur la aldonitan mendilon.
3. Anoncu vin kiel eble plej baldaŭ kaj pagu almenaŭ je la 15-a de Junio, por ke ĉio perfekte marŝu.
4. Kiam vi ricevos la rabatilon por la italaj fervojoj, vi tuj bv. sendi ĝin al mi.
5. Plenvvalidan pasporton necesas.

Ne hezitu fari demandojn se vi havas tiujn. Nur aldonu poŝtmarkon por la respondo.

SENZORGE VOJAGU! SENZORGE GUU PRI VOJAĜO KAJ KONGRE-
SO!

Mi esperas baldaŭ ricevi viajn ali-
ĝilon kaj petas al vi akcepti miajn
plej sincerajn salutojn.

LOGADO EN BOLOGNO DUM 7 NOKTOJ KAJ 7 MATENMANĜOJ

Laŭ komuniko de la L.K.K. estas preskaŭ senutile mendi unulitajn ĉambrojn ĝi instigas al interkonsento de geamikoj pri kunloĝado dum la Kongreso.

Se vi havas specialajn dezirojn oni nepre ne hezitu fari demandojn pri tio. Eble mi povos interveni kaj kontentigi vin.

Jen sekvas la prezoj por la diversaj kategorioj: (kun matenmanĝo).

Hoteloj

Luksa hotelo	f. 120,25	Estas kelkaj unulitaj ĉambroj en
Kategorio I	f. 86,25	ĉiuj kategorioj.
" II	f. 62,50	Ili kostas po f. 15.— pli.
" III	f. 54,50	Kompreneble ili estos baldaŭ
" IV	f. 49,—	for.

En Kolegio nur por viroj f 44,50)

En pensiono f 40,50)

En Instituto (nur por virinoj) f 31,50)

Kelkaj unulitaj ĉambroj estas haveblaj
F. 4,40 pli. Ili estos baldaŭ for.

Neniu hotelo aŭ alia loĝejo estas malproksime de la ejoj por la kongresarangoj.

La prezoj inkluzivas trinkmonon, imposton kaj makleron.

Ĉar la urbo Bologno estas relative malgranda mi insistas al baldaŭa mendo. Krome frua mendo garantias bonan ĉambron. La Nederlandanoj ja estas tre postulemaj tiurilate.

Ni esperas, ke vi baldaŭ decidus kaj mendos.

Intertempe mi petas al vi akcepti miajn plej sincerajn kaj

Samideanajn salutojn,

(J. Telling)

Postĉekkonto 2426-19
Telefono 01800 - 50871
Schietaanlaan 106-a
ROTTERDAM - C

Cefdelegito de U.E.A. en
la Nederlanda Teritorio.

Arango F.L.E.—R.B.L.E.

La ligaj kasistinoj F.L.E. kaj R.B.L.E. rememorigas al la personoj kiuj intencas ĉeesti la U.K. ke la kotizoj plialtiĝos la 1an de Aprilo. Ili estas por.

	ĝis 31/3/55	Poste
Individuaj membroj U.E.A.	270	320
Edzino	135	160
Studento	160	190
Ne individuaj		
membroj U.E.A.	320	370
Edzino	160	185

Aliĝiloj kaj kotizoj sendotaj al Sino J. Plson, rue Jourdan (straat), 185, Bruselo.

Kaj jen pliaj detaloj pri la proponita karavano:

Forveturo mardon la 26a de Julio laŭ Maubeuge, Reims ĝis Troyes. Merkrede laŭ Dijon Tournus ĝis Lyon. Ĵaŭde laŭ Valence, Avignon ĝis Marseille.

Vendrede laŭ la Mediteraneo: Toulon, Nice ĝis San-Remo.

Sabate laŭ Genova, Parma al Bologno.

Dum la kongresa semajno ni faros du tuttagajn kaj unu duon-tagan ekskursojn (Firenze — Rimini kaj San Marino — Ravenna estas proponitaj) *Reveturo* sabaton la 6a de Aŭgusto post la tagmez-manĝo laŭ Ferrara, Padua al Venezia (restado vespere kaj trankvilitado).

Dimanĉe laŭ Treviso al Cortina d'Ampezzo.

Lunde laŭ Brunico, Brenner pasejo al Innsbruck.

Marde laŭ la Innvalo, St. Anton, Bludenz al Unterwasser.

Merkrede laŭ Zurich, Basel, Colmar al Nancy.

Ĵaŭde laŭ Metz, Luksemburgo, Ettelbruck hejmen (11a de Aŭgusto)

Partoprenante la karavanon oni ne havos zorgojn pri loĝado aŭ manĝaĵoj.

Ĉar rezervado de loĝado, precipe en Bolonjo, tre baldaŭ devos okazi, la personoj kiuj intencas partopreni estas petataj sin anonci al F.ino J. Terriijn, Raapstraat 74, Gent.

Bonvolu vidi la sciigon en la gazeto de Januaro por la aliaj Komunikaĵoj.

Antaŭkongreso en Konstanz

La jam tradicia internacia feriosemajno en Konstanz (suda Germanujo) okazos ĉi-jare de la 23a ĝis la 29a julio, do ĝuste antaŭ la Universala Kongreso en Bologno. La organizon denove prizorgas s-ro Michel Schmidt, kaj la arango havas la subtenon de la urbestro. Petu la ilustritan prospekton ĉe I.F.S. Esperanto, Grüngang 8, Konstanz.